# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

**N° 200 MARTO 1999**

La numero : 10 FF Abono: 40 FF Kotizo: 20FF Sume: 60 FF

TRIMONATA BULTENO de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO
(Filio de I.K.U.E. = Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista)
BULLETIN TRIMESTRIEL DE L'ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE POUR L'ESPERANTO


*** *Sankta* PIO X-a, *preĝu por ni* ***

Imp. MOSER - 68127 NIEDERHERGHEIM



# Sommaire/*Enhavo*


| | Pages/*Paĝoj* |
|---|---|
| Le mot du président - *La bileto de la prezidanto* | 3 |
| Prière - *Preĝo* | 5 |
| Histoire - *Historio de nia asocio* | 6 |
| Mosaïque - *Mozaiko en Rimini* | 8 |
| Dans notre association -*En nia asocio* | 10 |
| Calendrier - *Kalendaro* | 15 |
| Congrès oecuménique - *Ekumena kongreso* en Gliwice Pollando | 16 |
| Annonces - *Anoncoj* | 20 |
| Abonnements - *Kotiztabelo* | 23 |


**ESPERANTO : INTERNACIA LINGVO**


Expéditeur/: Ass. Cath. Française pour l'espéranto
*Sendinto* 9, rue Paul Doumer
F- 68920 WINTZENHEIM-COLMAR


**Motif de non distribution**

- ☐ Adresse insuffisante
- ☐ N'habite pas à l'adresse
- ☐ Refusé
- ☐ Autres



Périodique Semi-routé

**PORT PAYE**

COLMAR (68)

Kopio de poŝtkarto eldonita okaze de la unua esperantista pilgrimo en Lourdes en 1914 ,(85 jaroj antaù ĉi-jara pilgrimo !)

Ĉu iu havas detalajn informojn pri tiu pilgrimo ?



L'esperanto. Face aux problèmes linguistiques, une langue neutre vraiment internationale pour les contacts directs d'homme à homme.

Ĉiujn artikolojn oni rajtas reprodukti kondiĉe ke estu citata la fonto.Specimenon kun represo aù tradukado oni sendu al la redaktoro.

La materialon por la bulteno oni sendu al la redakcio nepre antaù la 20.a de junio 99. Venonta bulteno aperos fine de junio.

Finpresado la 27/03/1999


**FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO**

**Nro 200 Marto 1999**

Trimonata eldonaĵo de Franca Katolika Esperanto Asocio (Association Catholique Française d'Esperanto A.C.F.E )

CCP : 2 324 93 N Rouen



Prezidanto:
S-ro A. BESSIERE
28,Rue C.St-Saëns
76000 ROUEN

Sekretario:
F-ino A.M CHANEY
56,Rue Corvisart
75013 PARIS

Kasisto :
S-ro G.VILLENEUVE
14,Rue Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON

Religia Konsilanto :
P-ro L.BOURDON
7,Av. Salomon
59800 LILLE

Peranto IKUE:
S-ro M.COLLEU
95,Rue Victor Hugo
80440 BOVES

Redakcio :
Fam.BASSO-RESCIO
9,Rue Paul Doumer
68920 WINTZENHEIM
Fakse 0389794333
Rete 100623,3022@Compuserve.com




# Le Mot du Président

Ce bulletin est le 200ème et marque les 50 ans d'activités de notre association après la dernière guerre. Mais en fait, sous une forme ou une autre la présence catholique au sein du mouvement espérantiste remonte aux toutes premières années de l'introduction de l'espéranto en France. C'est en effet en 1903 que notre fondateur, l'abbé Emile Peltier du diocèze de Tours, publie le premier numéro de la revue Espero Katolika, avant de réunir en 1910 les espérantistes catholiques dans une association qui leur soit spécifique.

Dépuis lors , que de chemin parcouru et d'efforts pour maintenir notre action malgré deux terribles guerres mondiales et des difficultés de toute sorte.

Après ces temps forts dûs à nos ainés, il convient de prendre conscience de notre situation actuelle et de rassembler de nouvelles énergies pour assurer l'avenir de l'espéranto dans les milieux catholiques. Ce sera l'un des buts de notre prochain pélerinage à Lourdes, où nous prierons la Mère de Dieu, la theotokos, de bénir notre action et de nous aider à rénover notre association en suscitant au plus tôt un nouveau président actif et dynamique, aidé de collaborateurs efficaces, afin que notre association prenne un nouvel essor, dans la ville de Lourdes qui abrite le tombeau de l'abbé Emile Peltier,notre fondateur.

Notre long passé est gage d'avenir et avec votre aide notre association prosperera.

# La Bileto de la prezidanto

Tiu bulteno estas la 200-a kaj stampas la 50 jarojn de aktivado de nia asocio, post la dua mondmilito. Sed fakte, sub iu aù alia formo, la katolika ĉeesto meze de la esperantista movado datumas ekde la unuaj jaroj de la enkonduko de esperanto en Francion. En la jaro 1903, nia fondinto, pastro Emile Peltier el la diocezo en Tours, publikigas ja la unuan numeron de la revuo Espero Katolika, antaù ol kunligi en 1910-a la katolikojn en fakasocio.

Depost tiu tempo, kiom da trairita vojo kaj kiom da klopodoj por firmigi nian aktivadon spite du teruraj mondmilitoj kaj ĉiaspecaj malfacilaĵoj.

Post tiuj fortaj paŝoj faritaj de niaj antaùuloj, konvenas ekkonscii pri nia nura situacio kaj amasigi novajn energiojn por respondi pri la estonteco de esperanto en la katolikaj medioj. Tio estos unu el la celoj de nia venonta pilgrimo al Lourdes, kie ni preĝos la Dipatrinon, la theotokos, por ke ŝi benu nian aktivadon kaj helpu nin renovigi nian asocion, vekante, kiel eble plej rapide, novan ageman kaj dinamikan prezidanton, helpatan de efikaj kunlaborantoj, por ke nia asocio ekhavu novan impulson en la urbo Lourdes, kie staras la tombo de nia fondinto,Pastro Emile Peltier.

Nia longdaùra pasinteco garantias nian estontecon; kun via helpo nia asocio kreskos.






# PREĜO

Sinjoro , pardonu niajn silentojn
Kiam estis necese paroli.
    Pardonu niajn senvalorajn parolojn
    Kiam estis necese agi.
Pardonu nin,ĉar ni konfuzis
Vian Evangelion kaj niajn saĝojn.
    Pardonu nin,ĉar ni limigis nian servon
    Al tiuj, kiuj plaĉis al ni.
Pardonu nian mezkvalitecon
Nian mankon de amo kaj sinofero.
    Pardonu niajn ŝuldojn
    Kiel ni pardonas
    Al niaj ŝuldantoj.
Kaj instruu nin pardoni
Sen ofendi niajn pardonitojn.
    Per Kristo, nia Savanto, Amen

(Protestanta preĝo)



# *Historio de nia asocio :*

*Nia bulteno atingas la numeron 200 , antaù la sojlo de la Jaro 2000 ! Baldaù en 2003 ni festos la Centjariĝon de la unua katolika revuo en esperanto, kiu estis eldonita en Francio. Ĉiuj informoj pri nia historio estas bonvena ĉe la redaktoro: (fotokopioj de malnovaj bultenoj, nomoj de prezidantoj, lokoj de kongresoj, fotoj, ...*
*Jen kelkaj informoj laù dokumentoj de S-ro Bessière kaj S-ro Junier (Nacia Esperanto Muzeo)*

1903 : Pastro Emile Peltier fundis la monatan bultenon "Espero Katolika ": Redakcio en Tours.
Ĝi ankoraù ekzistas kaj estas la plej malnova revuo en esperanto.

1946 : Jam ekzistis nia bulteno "Franca Katolika Esperantisto " por la restarigo de nia asocio post la dua mondmilito.
Prezidanto :Kanoniko Duvaux
Redakcio: F-ino Cecile Royer PARIS X°

4-5-1953
-Fundo de la "Ligue Française Catholique espérantiste ."- JO de 17.5.1953
-Sidejo ĉe F-ino Le Boedec Parizo 14°




15-4-1971
-La nomo ŝanĝis en " Association Catholique Française Espérantiste"
-Sidejo ĉe S-ino Vincent en Andelys (Eure)
-JO 25-4-1971

6-5-1977
-Sidejo ĉe S-ino Vincent en Baugé (Maine et Loire) -JO 24-5-1977

11-6-1996
-Sidejo ĉe F-ino Chaney en Parizo 13°
-JO 3-7-1996 P.3213

-Baldaù ni estas en la jaro 2000
-Ĉu vi havas ideojn por vigligi nian asocion ?
-Skribu ! nia bulteno estas nia ligilo, nur kune ni sukcesos .
-Ni kunlaboru kun ne-esperantistaj katolikaj asocioj.




***ĈU VI JAM REKOTIZIS POR 1999?*** *SE NE, TIU*
*ĈI ESTAS LA LASTA NUMERO DE NIA REVUO KIUN VI ANKORAŬ RICEVAS!*

# La mozaiko en Rimini

La mozaikisto Antonino Vaccalluzzo el Raveno finis, kaj oni eĉ inaŭguris oficiale la 1-an de novembro 1998,trian verkon kun areo de 15 kvadrataj metroj. La antaŭaj du mozaikaj partoj estis inaŭguritaj antaŭ la







IKUE-Kongreso (1997). Sume ĉiuj tri havas areon de preskaŭ 35 kvadrataj metroj.

Tiu lasta mozaiko bildas la figurojn de la paroĥaj patronoj la sanktaj Johano kaj Paŭlo en natura alteco. Ili estas lokitaj sur la maldekstra flanko (rigardante la altaron) de la triumfa arkaĵo super la presbiteriejo. Sur la dekstra flanko de la triumfa arkaĵo oni bildis la figuron de la beata (beat-pro-klamota la 2-an de majo 1999) Patro Pio. Centre kaj supre de la ar- kaĵo troviĝas tri medali- onoj kun la brustbildoj de la tri patronoj de Eŭropo, laŭvice de maldekstre: sanktaj Cirilo, Benedikto kaj Metodo. Ĉiuj figuroj troviĝas inter serio da nubetoj ŝvebantaj en la ora fono.

Kompreneble, ĉiuj figuroj havas sian nomon dulingve: itale kaj Esperante. Krome, maldekstre sub la figuroj de la du sanktaj paroĥaj patronoj situas mozaikero fi-guranta olivarbon, ĉe kies bazo estas sur-skribita ŝildo: *La Comunità parrocchiale, 1998,* dum dekstre, sub la figuro de Patro Pio, situas alia simila mozaikero figuranta garbon da grenspikoj kaj vinberaroj kun subskribita ŝildo: *La katolikaj esperan-tistoj, 1998.*

Tiuj informoj donitaj de Pastro Duilio Magnani konigis nin kun la belega mozaika unikaĵo. La kongresintoj certe bone memoras, ke apud la menciita preĝejo staras ankaŭ bela staturo de Patro Pio.



*Tagmanĝo de fratoj Kalný, Sarandrea, Kóbor kun kuriozaĵo. La supon oni manĝas ne per kulero, sed per forketo kaj trancilo. Temas pri tre bongusta supo kun amaso da marestaĵoj, por ni nekutima manĝaĵo.*



Indas aldoni, ke ĝuste en la unua tago de la Estrar-kunveno, la 21-an de decembro, dum mescelebro de Pastro Duilio Magnani kun Sankta Patro, estis oficiale anoncite, ke beatiga ceremonio de Patro Pio okazos la 2-an de majo 1999. Tiu anonco, donita ĝuste dum la kuncelebro de Pastro Duilio, kaŭzis grandan ĝojon al la kunvenantaj IKUE-estraranoj, sed kompreneble precipe al Pastro Magnani mem. Ni do ĝoju, ke venontjare la esperantistoj havos la okazon honorigi la beatulon Patron Pio en Rimini, kie li estas tre amata kaj honorata.

La estraranoj vizitis ankaŭ Bazilikon de Sankta Petro, por preĝi ĉe lia tombo (ankaŭ ĉe tombo de Kardinalo Beran), kaj Vatikanan Radion por surbendigi intervjuojn por esperantlingvaj programoj. Fakte temis pri interkonatiĝo kun tuta domkomplekso, kie troviĝas naciaj sekcioj de la Vatikana Radio. Oni do vizitis kelkajn el ili. Speciale tre kora estis vizito de ĉeĥa sekcio kaj renkonto kun ĝia estro Pastro Koláček. La vizito de R. V. kompreneble ankaŭ kontribuis al praktika montro de utileco de Esperanto, ĉar samtempe ĉeestis esperantistoj el kvin nacioj. Oni povas konstati, ke dank' al Dio nuntempe ĝuste en la Katolika Eklezio Esperanto trovas pli favoran pozicion ol en aliaj sferoj. Ni do konstante laboru celante Regnon de Dio, kaj certe ni povos spite de ĉiuj obstakloj esperi pri benoj de nia laborado.

*Miloslav Šváček*

## Radio Vatikana - Radio de la Papo

**AŬSKULTU PROGRAMOJN EN ESPERANTO**



Ekde la 15-a de oktobro 1998 Radio Vatikana elsendas trifoje semajne:

**DIMANĈE** - horo 21.20 laŭ mezeŭropa tempo, frekvencoj: mezonde 527 kaj 1530 kHz, kurtonde 4.005 (74.90 m.), 9.645 (31.10 m.) kHz.

**MERKREDE kaj ĴAŬDE** - horo 21.20 laŭ la mezeŭropa tempo, frekvencoj: mezonde 1611 kHz, kurtonde 7.250 (41.37 m.), 9.645 (31.10 m.) kHz.

Skribu al adreso de Radio Vatikana, ĉar ankaŭ viaj aŭskultado kaj skribaĵoj argumentos pri graveco de ekzisto de esperantlingvaj programoj. Petu la senpagan sesmonatan program-bultenon.

**RADIO VATIKANA, Esperanto-Redakcio**
**SCV-00120 CITTÀ DEL VATICANO**

# Protokolo de la Komitatkunveno de la 2O-a de Januaro 1999

Ĉeestis :S-ro Bessière,F-to Marmou,F-inoj Chaney kaj Michel ,S-roj Colleu,Despiney,Pons kaj Villeneuve.

Petis senkulpigon: Pastro Bourdon,S-ro Basso,G-roj Lafargue.

S-ro Villeneuve prezentis la financan raporton pri la jaro 1998,kiun vi legos aparte. La komitato prizorgis la lastajn detalojn pri la pilgrimo al Lourdes, kie oni uzos la meslibreton ĵus preparita de s-ro Colleu.

F-ino Chaney petos de UFE,ke nia bulteno estu listigita kun la aliaj aboneblaj revuoj sur Franca Esperantisto.

En Lourdes ni diskutos pri la loko de nia venonta kongreso en 2001. En 2000 ni havos nur ĝeneralan kunvenon en Parizo.

S-ro Pons raportis pri la situacio de la eta biblio "Dio parolas al siaj infanoj" ; ĝi estas bona kaj li povos sendi multajn senpagajn ekzemplerojn al nepagopovantaj esperantistoj.

La venonta komitatkunveno okazos en Lourdes la 2-an de majo 1999 dum la mateno.



# AGADRAPORTO PRI LA JARO 1998

La jaro 1998 estis plenplena de esperantaj okazaĵoj, en kiuj partoprenis nia asocio.

La ekumena kongreso en Rézé apud Nantes estis sukcesa . 8O samideanoj el 15 landoj kune kaj amike vivis tutan semajnon, preĝante kaj diskutante pri ekumenismo kaj teologiaj aferoj, precipe pri la teorio de la pravigo. Dimanĉe la tuta kongresaro partoprenis la katolikan diservon en la paroĥo S-ta Domiciano kaj poste la diservon en la protestanta preĝejo.

Nia asocio vigle partoprenis en la Universala Kongreso en Montpellier. Pluraj el niaj membroj deĵoris dum la tuta kongrestempo kiel helpantoj. Ni organizis, dank'al la diligenta laboro de S-ino Tora ekumenan diservon en la preĝejo de la Sanktaj Franceskoj, kiun partoprenis pli ol 700 ĉeestantoj. Same dum la tuta kongresa semajno eùkaristio estis celebrita ĉiutage je la 12-a por la katolikoj en la apuda preĝejo Nia Sinjorino de la Tabloj.

S-ro Pons daùrigis sian senlacan agadon por disvendi la etan biblion "Dio parolas al siaj infanoj". Tiu libreto bone staris en la libroservo de UEA dum la tuta kongreso kaj multaj aĉetis ĝin.

Dum la jaro 1998 ni bedaùris la forpason de pluraj el niaj anoj:S-ino Le Coguiec en Arradon (56), S-ro Perdraud en Libourne(33), D-ro Sola (Italio), S-ino Guillot en St Pierre ès Champs

(60) ,S-ro Mudrak (Austrio).

Dio donu al ili la senfinan pacon.

Je la jarfino nia asocio nombris 125 membrojn, do 4 malpli ol en la jaro 1997.

## EN NIA ASOCIO

Donacis monon :G-roj CHIALVO, LEVAL, THIOLLIERE, VILAS kaj VILLANOVA.

Bonfarantoj 1999: : G-roj LAFARGUE, LECOCQ kaj GILLES

Dankegon al ili pro ilia grava helpo al nia asocio.

### FINANCA RAPORTO 1998

| ENSPEZOJ | FF | ELSPEZOJ | FF |
|---|---|---|---|
| Kotizoj | 5420,70 | Bulteno | 2333,25 |
| Donacoj | 1920,00 | Donacoj | 3000,00 |
| Rentumo ŝparkaso | 0,00 | Korespondado | 414,68 |
| Kongresaj aliĝiloj | 60,00 | Komitatkunvenoj | 940,00 |
| Kongreso | 2940,00 | Kongreso | 0,00 |
| Libro eldonado | 0,00 | Libro eldonado | 1791,00 |
| | | Poŝta takso | 7,00 |
| SUMO | 10340,70 | SUMO | 8485,93 |
| Enla kaso 01/01/98 | 21009,75 | En Ŝparkaso | 11329,47 |
| Positiva saldo | 1854,77 | En P.Ĉ.K | 11535,05 |
| En la kaso31/12/98 | 22864,52 | Sumo | 22864,52 |

La Kasisto : G. Villeneuve



## ĜENERALA KUNVENO 1999
## RENOVIGO de 1/3 de la KOMITATO

La ĝenerala kunveno de nia asocio okazos en Lourdes la 2-an de majo 1999 je la 9.30.

En tiu ĝenerala kunveno ni devos renovigi unu trionon de la komitato.

Jen la instrukcioj por la voĉdonado:

1)Respondu al la demandojn 1 kaj 2 sur la voĉdonilo,kiu staras en la sekvanta paĝo,

2) Enmetu la voĉdonilon en koverto sen-indiko

3) Enŝovu ĉi-tiun en alian,kiun vi sendu al la sekretariino

- F-ino Chaney
  56,rue de Corvisart
  75013 PARIS ,

***antaŭ la 20-a de aprilo 1999***

4) Dorse de tiu koverto;skribu la vorton VOĈDONO kaj vian nomon.

**Atentu !** Ne sendu ion alian en ĉi tiu koverto, kiun oni malfermos nur en la Kongresejo, la 2-an de majo 1999.

# VOĈDONILO

1) Ĉu vi aprobas la agadraporton ?

JES NE SINDETENO (1)

2) Ĉu vi aprobas la financan raporton ?

JES NE SINDETENO (1)

3) Renovigo de 1/3 de la komitato.

Estas 4 kandidatoj por 4 postenoj . Vi rajtas forstreki nomojn, sed devas resti maksimume 4 nomojn entute.

| | |
|---|---|
| F-ino Chaney | S-ino Lafargue |
| S-ro Lafargue | F-ino Michel |

(1) Forstreku la senutilaĵojn .

Sendu ĝin al : F-ino Chaney
56,Rue de Corvisart
75 013 PARIS

nepre antaù la 20-a de aprilo 1999.



# KALENDARO

1999

30/04 ĝis 04/05 — LOURDES
Pilgrimo de Franca Katolika Esperanto Asocio.

17/07 ĝis 24/07 — SEBRANICE (Ĉehio) apud Litomysl
18-a IKUE E-Tendaro Prezo : 400 FF
Oni dormas en 2-litaj bonkvaliataj tendoj.
Ĉiu tendara tago komenciĝos per esperantlingva Sankta Meso en tendara kapeleto. Por la tuta dusemajna restado pagos gejunuloj nur 400 FF (inkl.manĝoj), ( 500 FF por plenkreskuloj averaĝe)

31/07 ĝis 07/08 — BERLINO (Germanio)
84-a Universala Kongreso de Esperanto
http://www.Esperanto.de/uk99

07/08 ĝis 14/08 — GLIWICE (Pollando)
14-a Ekumena Kongreso
52-a IKUE Kongreso
49-a KELI Kongreso
JET'99 (Junulara E° Tendaro)

03/09 ĝis 07/09 — L'AQUILA (Abruzzo: Italio)
13-a Katolika Itala Esperantista Kongreso

# 14-a Ekumena Kongreso

**52-a de IKUE** **49-a de KELI**

7 – 14 Aŭgusto 1999

**en Gliwice, Pollando**

*".. ke ĉiuj estu unu .."*

*La ordono de Jesuo,*

*kaj la stato de ekumeno sojle de la 3-a jarmilo*

La 20-a jarcento de la Kristanismo estas la jarcento de kreskanta ekumeno. Kion ni atingis? Kio estas nun komuna inter la Kristanaj eklezioj? En ĉi tiu ekumena kongreso ni volas bilanci. Sed antaŭ ĉio ni volas kune vivi Kristane, preĝante por plia progreso de unueco inter la gefratoj de Jesuo Kristo, **"por ke la mondo kredu"**.

Joh 17,21

La Estraroj de IKUE kaj KELI decidis laŭ la propono de Ekumena Komisiono kunvoki la Kristanan Esperantistaron je 1999 al 14-a Ekumena Kongreso en Pollando. La kongreso okazos en Gliwice tuj post la UK Berlino. La Ekumena Komisiono ankaŭ decidis, samtempe samloke organizi 3-an Junularan Ekumenan Esperanto-Tendaron JET'99. (Oni povas ricevi apartan informilon ĉe unu el la subskribintoj; sed aliĝo eblas jam per la apuda aliĝilo.)

Oni atentu la **speciale favorajn prezojn por familioj kaj por grupoj**. Tio estas la ŝanco, kunvenigi parencajn aŭ konatajn junulojn kaj familiojn al nia Esperanto-kunveno. Estas antaŭkondiĉo, ke la junuloj kaj infanoj jam komencis lerni Esperanton. Tion konfirmu antaŭe grup-gvidanto aŭ gepatroj. Dum la kongeso ni donos kurson por komencantoj kun antaŭscioj kaj paroligan kurson.

Ni kore invitas vin aliĝi al nia 14-a Ekumena Kongreso Gliwice 1999.

***Adolf Burkhardt*** kaj ***Bernhard Eichkorn***



## Aliĝilo

al Stanisław MANDRAK (la adreson vidu sube sur la lasta paĝo)

*Familioj kaj grupoj bezonas nur unu aliĝilon. La grupestro aŭ unu el la gepatroj krucsignu sube kesteton kaj metu sian nomon en la suban linion:*

☐ Mi/ni aliĝas al la 14-a Ekumena Kongreso 1999 en Gliwice, Pollando

☐ Mi/ni aliĝas al JET'99 en Gliwice, Pollando

Tuta nomo: ____________________

Bonvolu skribi vian familian nomon MAJUSKLE kaj la personan nomon minuskle

Adreso: ____________________

Lando (en Esperanto): ____________ telfono: ____________

faksnumero: ____________ reta adreso: ____________

(Nur JET-aliĝantoj): La aer-linia distanco de mia loĝ-loko al Gliwice estas ĉ.: ______ km

**Familio/grupo:** Kun mi venos: ____________________

*Skribu ĉi tie la nomojn kaj en krampoj la aĝojn (ĝis 25 jaroj)* ____________________

**Loĝado:** Grupanoj/familioj ricevos du- aŭ tri-litajn ĉambrojn laŭ siaj nombroj.

Mi/Ni mendas ☐ unu-litan ☐ du-litan ☐ tri-litan ĉambron

Mi/Ni mendas en la hotelo Piast ☐ unu-litan ☐ du-litan ĉambron

Mi/Ni volas partopreni nur dumtage sen kongresaj tranoktoj ☐

**Manĝoj:** Mi/Ni **ne** volas partopreni la kongresajn manĝojn ☐

*Grupoj/familioj skribu en la kesteton la nombron de la personoj, kiuj deziras vegetarajn manĝajojn; unuopaj vegetraranoj skribu 1* ☐

**Ekskursoj:** *(Elektu unun el du, ĉar la ekskursoj okazos samtempe. Grupoj/familioj skribu en la kesteton la nombron de la personoj)*

Mi aliĝas ekskurson al ☐ Auschwitz/Oświęcim, aŭ **samtempe** al ☐ Krakovo

Mi proponas jenajn kontribuojn al la kongresa programo (temo, daŭro): *(Atentu, ke en la limigita tempo de la kongreso ne ĉiuj ofertoj povas esti prezentataj)*

____________________

____________________

*La aliĝo validas post pago de la aliĝ-sumo (Partoprenantoj el nepagipovaj landoj pagos la aliĝ-sumon en la kongreso).*

**Gliwice** situas en sud-okcidenta parto de Pollando en Supra Silesio 30 km okcidente de Katowice inter Wrocław kaj Kraków. Ĝi estas atingebla el Berlino trajne kaj aŭtomobile en 7 horoj.

En Gliwice **ni kongresos en fervojista teknikumo** ***Collegium Nobilium*** (kolegio nobla), strato Chorzowska 5. La kongres-domo kaj la dorm-domo estas du plur-etaĝaj konstruaĵoj kunligitaj, do kvazaŭ sub unu tegmento. Ĉ. 100 ĉambroj kun po tri litoj estos je dispono kiel unu-, du- aŭ tri-litaj, sufiĉe grandaj dormejoj, ĉiu kun flu-akvo, ŝranko kaj tablo. Duŝoj kaj necesejoj estas en la koridoroj. La kongresejo situas en kvieta loĝ-kvartalo, piede 20 minutojn norde de la stacidomo. La tram-linio 1 ligas la urbo-centron tra la stacidoma placo kun la kvartalo de nia kongresejo. La JET-anoj loĝas en aparta koridoro.

Se iuj preferas loĝi en la hotelo Piast, 600 m de la kongresejo, ni luos unu-litajn ĉambrojn por 110 Złoty/tage aŭ du-litajn ĉambrojn por 130 Złoty/tage, ĉiam kun matena manĝo en la hotelo. Pagendas la aliĝ-sumo kaj la prezo 2.2.

Dank' al malaltaj prezoj en Pollando ni povas fondi Helpan Kason, el kiu estos subvenciataj familioj kaj gejunuloj. Jam per la Gostyń-a kongreso 1994 ni ekipis Helpan Kason, kiu ebligis Junularajn Tendarojn 1997 kaj 1998, kaj el kiu ni povis arigi sukces-plenan grupon de Kristanaj Esperantistoj en Graz 1997.

## Prezoj:

**Tarifo A** en Zlotoj (Eks-socialismaj landoj sen GDR) **Tarifo B** en DM (ĉiuj aliaj)

| | ĝis 31.3.99 | ekde 1.4.99 | ĝis 31.3.99 | ekde 1.4.99 |
|---|---|---|---|---|
| **1. Kongresa aliĝ-sumo:** | A: 20.-ZŁ; | A: 40.-ZŁ; | B 70.- DM; | B 90.- DM; |

| **2 .Kongres-prezo** aldone pagenda en la kongreso | | **Tarifo A** | **Tarifo B** |
|---|---|---|---|
| 2.1. Normala prezo: | unu-lita ĉambro: | 450,- ZŁ | 450,- DM |
| sumoj pagendaj kontante | du-lita ĉ./1 persono: | 390,- ZŁ | 390,- DM |
| en Zlotoj (A) aŭ DM (B): | tri-lita ĉ./1 persono: | 340,- ZŁ | 340,- DM |
| 2.2. Prezo sen kongresaj tranoktoj, sed kun manĝoj: | | 210,- ZŁ | 210,- DM |
| 2.3. Familioj kaj grupoj ĝis 6 personoj (1 aŭ 2 responsa(j) plen-aĝulo(j), kaj inkluzive de ĉiuj infanoj/junuloj ĝis 25 jaroj): | | 500,- ZŁ | 500,- DM |

**3. JET'99-anoj** loĝos aparte, sed en la sama domo, iom pli simple, ekz. ili ne havas lit-tukojn kaj devas kunporti dormo-sakojn. Ili havas grand-parte propran junularan programon. La prezoj estas pli malaltaj ol en la kongreso, sed la plen-aĝaj responsuloj de la grupoj kaj la aliaj partoprenantoj de JET (prezo 4.3.) helpos en la porjunula kaj porinfana programoj. Partoprenantoj de JET'99 el ekssocialismaj landoj, kiuj loĝas pli ol 500 km aer-distance de Gliwice, ricevos jenan vojaĝ-subvencion. Se la loĝ-loko distancas de Gliwice: pli ol 500 aer-liniajn km = 50.- DM; pli ol 1000 aer-liniaj km = 100.- DM; pli ol 1500 aer-liniaj km = 150.- DM.



**4. JET'99-anoj pagas jenajn JET-prezojn:**

4.1. Unuopaj junuloj ĝis 25 jaroj: Tarifo A: 90,- Złoty; Tarifo B: 90,- DM

4.2. Familioj/grupoj ĝis 6 personoj (1-2 responsa(j) plen-aĝulo(j), kaj inkluzive de ĉiuj junuloj ĝis 25 jaroj): Tarifo A: 300,- Złoty; Tarifo B: 300,- DM. Do en 6-persona grupo ĉiu pagos 50 Zlotojn aŭ DM plus la aliĝ-sumo.

4.3. Aliaj partoprenantoj de JET'99: Tarifo A: 190,- Złoty; Tarifo B: 190,- DM

**Pagu** la aliĝ-sumon al jena banka konto: **Polski Zwiazek Esperantystow O/Gliwice, Bank Slaski Katowice, I O/Gliwice, nr 10501285 - 0202114427.** Aŭ por eviti altajn bank-kostojn, pagu al **UEA-konto sman-e** de Stanisław MANDRAK. Sed tiu-okaze nepre informu s-ron MANDRAK rete aŭ poŝt-letere.

### Provizora Kongresa Programo

**Vendredo, 6.8.1999**
Akcepto kaj loĝigo:
16h00 -18h00, 20h00 -21h00.

**Sabato, 7.8.99**
Akcepto kaj loĝigo: 10h00 -12h00
15h00 - 17h30, 19h00 - 21h00
18h00 Vespera manĝo
19h30 Interkona vespero finiĝonta per vespera preĝo

**Dimanĉo, 8.8.99**
08h15 Matena manĝo
Komuna matena preĝo
Dimanĉaj Diservoj en paroĥoj kaj
Solena Malfermo eble posttagmeze
13h00 Tagmeza manĝo
18h15 Vespera manĝo

**Dumsemajna taga programo**
06h45 Sankta Meso
07h45 Komuna matena preĝo
08h15 Matena manĝo
09h00 Komuna kantado
10h00 kaj 11h00: Prelegoj
12h00 Tagmeza preĝo
12h30 Tagmeza manĝo
15h00 Popolaj dancoj
16h00 kaj 17h00: Prelegoj
18h15 Vespera manĝo
20h00 Vespera programo
21h45 Vespera preĝo

**Sabato, 14.8.1999**
Adiaŭa Mateno

Ko 1: A:\Gliwice98\Fina invitilo 1999 Gliwice.wpd

**Kore invitas vin** nome de KELI, IKUE kaj de la LKK:


*Adolf BURKHARDT*
Gimpelweg 1
D-73235 Weilheim/Teck
fakso ..49 7023 72413

*Bernhard EICHKORN*
Romäusring 20
D-78050 Villingen
fakso: ..49 7721 22074
b.eichkorn@t-online.de

*Stanisław MANDRAK*
str. Kormoranow 39-16
PL-44114 Gliwice
staman@priv.onet.pl


Atentu informojn daŭre aktualigotajn en: *http://home.t-online.de/home/st-fidelis*

# ANONCOJ

01/

La turisma oficejo en Lourdes kapablas doni informojn en ESPERANTO al la pilgrimantoj pri hoteloj, restoracioj, vidindaĵoj de la urbo kaj de la regiono.

(laŭ informo de S-ro Morin Jacques)

02/

En Junio 1997,dum la Konferenco pri Iniciato por Unuiĝintaj Religioj (URI) en la Stanforda Universitato,unu el la partoprenantoj diris: " Kio okazus se la lastan tagon de tiu ĉi jarmilo,la 31-12-1999, la religioj de la mondo alvokus al tutmonda batalhalto ?

Ekde tiam,la URI-stabo kaj kelkaj alaij petis homojn en la tuta mondo imagi tian tagon. La antaŭvidaĵo ekformiĝas; kaj estas klare ke la ebloj estas spirmankigaj.

-La 31-12-1999 estos vendredo. Ni supozu ke ,kiel spiritan fundamenton de tiu ĉi tuta projekto,religiaj gvidantoj ĉirkaŭ la tero kune deklaros ke de tiu vendredo ĝisla dimanĉo estu speciala spirita tempo, kaj invitos ĉiujn popolojn kaj tradiciojn de la mondo kune observi ĝin.

-Kaj ni supozu ke dum tiu ĉi tempo,oni esploros milmaniere la novan antaŭvidaĵon de interreligia pacigo kaj kunlaboro,malfermante niajn kunvenejojn por gastado,kuna preĝado, aŭskultado de la historioj deunuj kaj aliaj, kaj kuna celebrado.

Ĉu vin (vian organizon,vian komunumon) interesus partopreno en tiu-ĉi monda strebado ? Bonvolu kontaktiĝi, mi petas, kun la URI-sidejo, P.O.Box 29242 , San Francisco, CA 94129-0242,USA(aŭ:office@united-religions.org).

(el Revuo ASISTILO Nro 22 )



03/ Omaĝe al Episkopo Ladislavo Miziolek

Okaze de la 30-a datreveno de la episkopeco. L.E Episkopo Ladislavo Miziolek atingis gravan kaj raran jubileon de sia posteno. La 25-an de marto 99 forpasas ja 30 jarojn de lia episkopeco. Tiun daton ni ne povas pretervidi. Li estas meritoplena por la Eklezio, ekumenismo kaj Esperanto-movado. Speciale tion devas senti la katolikaj esperantistoj el la tuta mondo. Ĉiuj do gesamideanoj povas gratuli la eminentan Jubileulon al jena adreso :

PL-OO-498 VARSOVIO , str.Ksiazeca 21.

# LETERKESTO

Estimataj gesamideanoj de la F.K.E,

*Kun granda espero, mi ĝojas prezentiĝi al vi. Efektive, mi estas afrikana samideano el Kamerunio. De kelkaj monatoj, mi estas en Francio kaj mi loĝas ĉe la suba adreso. Mi estas studanto por la pastra vivo. Mi estas en la kvina jaro de la studadoj. Mi bonvolus konatiĝi kun vi, por akiri informojn pri viaj agadoj. Mi trovis vian adreson en Espero Katolika kaj tio ege ĝojigis min.*

*Espere, Respekte kaj sincere via,*


Gabriel ANDA
Abbaye Saint-Pierre
07 340 Champagne/Rhone

Red: Bonvenon en nia asocio, kiu bezonas junaj fortoj.

## KANTO POR LA VOJO AL LA JARO 2000

Preĝo de la Papo Johano Paŭlo la II-a
Aprobis kaj rekomendis Ĉeĥa Episkopa Konferenco 20.1.1998

Ĉeĥa teksto: Josef Hrdlička
Melodio: Josef Olejník
Esperanta traduko en junio 1998: Josef Cink




2. Elektis Vi popolon Izraelan / por Vi kaj faris kun ĝi la kontrakton. / Dum venis temp´ por via Fil´ Jesuo / kaj Vi nun per Li iras ĉiam kun ni. / Dankas ni al Vi.

3. Via Spirit´ kun Eklezi´ Vin ligas, / donacojn viajn al ĝi riĉe verŝas, / sanktan kaj pekan Eklezion vian / trans sojlon gvidu de jarmilo nova. / Fidas ni al Vi.

4. Vian rigardon montru al nuntempo, / en ver´ kaj via amo vivu homoj / kaj la popoloj en la justa paco, / en nia frat´ Sinjor´ Jesuo Kristo. / Amen, amen.

el Bulteno : DIO BENU Nro 31



Tutkorajn Bondezirojn okaze de la PASKO 1999.

N.B.

## Kotiztabelo 1999

| | Frankoj | Euroj |
|---|---|---|
| I.K.U.E kun "Espero Katolika" | 140 | 22 |
| Peranto : S-ro M. COLLEU<br>95,Rue Victor Hugo 80440 BOVES<br>P.ĉ.k 10 621 81 P LILLE . | | |
| A.C.F.E kun "Franca Katolika E-isto" unuopulo : | 60 | 10 |
| geedza paro : | 80 | 13 |
| gejunuloj ĝis 25-jara,pastro,religiu(in)o : | 30 | 5 |
| bonfaranto : | 200 | 31 |

Pagu al: Ass.Cathol.Franc.Esperanto CCP ROUEN 2.324.93.N

Dépot légal : 1er trimestre 1999 C.P.P.A.P : N° 62532
Imprimé par : A.C.F.E à 9,Rue Paul Doumer 68920 WINTZENHEIM
Enregistrée le : 14 Juin 1996 à la Préfecture de Police de Paris
sous le n° 026831 ; Journal Officiel du 03/07/1996
Directeur : Albert BESSIERE Directeur délégué: Michel BASSO